Maandblad - voor leden van FLE gratis

25ste jaargang no. 12 - december 1956

# Laborista ★ Esperantisto

Orgaan
van de Bond van
Arbeiders-
Esperantisten FLE

In het gebied van de Nederlandse taal

Redactie, Administratie en Secretariaat van de Bond van Arbeiders-Esperantisten: Admiralengracht 214, Amsterdam-W. - Postgiro Amsterdam 331133

## JARRAPORTO FLE

### Agadjaro: 1-10-'55 / 30-9-'56

**KONGRESVIZITO**

Enkonduke al ĉi tiu agadraporto de nia Asocio, mi unualoke traktu tre bedaŭrindan fenomenon, nome, la maleston de multaj sekcioj en nia lastokazinta kongreso.
Pritraktante ĉi tiun punkton en nia postkongresa kunveno, la Asocia estraro decidis sendi leteron al la koncernaj sekcioj petante informi ĝin pri la kaŭzo de la ne-ĉeesto. Ni poste konstatis, ke nur kelkaj ricevintoj respondis la informpeton.
Konsiderante la favoran situon de la kongresurbo, ni antaŭvidis grandnombran viziton kaj pro tio ni krom „Het Zonnehuis" luis parton de „Meenthuis" kondiĉe, ke la lokoj luitaj estu okupataj. Kelkajn semajnojn antaŭ la kongreso montriĝis, ke la aliĝoj al la kongreso sufiĉis por subtegmenti la gealiĝintojn en „Het Zonnehuis". Sekve de tio la Asocio estis devigata pagi — malgraŭ nia peto pri nuligo — la garantian sumon de *f* 40.—.

**PROPAGANDILOJ**

La decidojn pri malmultekostaj propagandiloj la Asocia estraro plenumis, havigante al la sekcioj kaj distriktoj fenestro-bileton, provlecionon kaj kompletan skriban kurson laŭ reduktita prezo.
La skriba kurso estis akompanata de cirkulero, kiu atentigis la ricevinton okaze de neakcepto resendi ĝin je la 1a de aŭgusto. La efiko de nia atentigo estis, ke la sekretario monatojn post la limdato ricevadis la senditajn kursojn. Ke niaj bonintencoj ne de ĉiu ricevinto estas komprenataj, pruvis la ricevo de letero, kies enhavo komprenigis al ni, ke nepetitaj sendoj estos rifuzitaj. Estu dirite al tiu ĉi kamarado, ke ni neniam intencis, trudi la akcepton de la sendita kurso sed nur plenumis kongresdecidon.

**SEKCIA VIVO**

Legante la ricevitajn monatajn bultenojn kaj sekciajn gazetojn mi ekhavas la impreson, ke la konversaciaj vesperoj ne plu havas altirfortojn por la sekcianoj.
Kelkfoje la sekciaj estraroj penas kompili interesajn programojn sed la efiko ofte estas mala al la penoj. Estas tute natura fakto, ke ne ĉiu membro interese scipovas prelegi aŭ verkadi sed li aŭ ŝi minimume kunlaboru per regula vizitado de la vesperoj. Ni fosu nian sulkon, sed kune!

**ESTRARANOJ**

Dum nia agadjaro la Asocia estraro perdis kelkajn kunlaborantojn, nome, la k-dojn H. Schoonenberg kaj R. Kraefft, la unuan ne laŭaĝe sed laŭsperte veterano eksiĝis pro transloĝiĝo, la duan laŭaĝe entuziasma sed kiu deziris eksiĝi pro deviga studado por sia nova ofico. De tiu ĉi loko ni kore dankas ilin pro ia multfarita laboro por nia movado.
Necesas do kompletigi la Asocian estraron, kiu en ĝia nuna konsistigo estas tro ŝarĝita kaj ĝi trovis k-don A. L. Allis preta akcepti ian funkcion en la estraro. Tamen restas la problemo trovi kelkajn volontulojn, ĉar ankaŭ nia k-do J. Pouli intencas eksiĝi kiel kasisto.

**GRAVA PERDO**

La forpaso de nia karmemora k-do G. P. de Bruin, kiu dotita de la naturo per kreadforto kaj pri kies ekzisto atestas la sennombraj kontribuaĵoj sur lingva kaj historia terenoj, lasas en nia movado vakuon preskaŭ ne plenigeblan.
Ni laŭkapable imitu la ekzemplon de nia k-do De Bruin. Ke ni ne tuj rikoltas la fruktojn de nia penado ne tiom gravas. Ni scias, ke per niaj modestaj rimedoj la vojo al fina venko estas dorna kaj kruta, ankaŭ pro la fakto, ke ni esperantistoj apelacias al la prudento de la individuo per paciga idealo forĵetante perforton aŭ falsan romantismon.

**NIAJ RILATOJ**

Ĝojige estas, ke niaj rilatoj en- kaj eksterlandaj estas harmoniaj. Ni esperu, ke nia paca strebado fine trovos eĥon ĉe niaj klasfratoj.

**PRELEGVOJAĜO**

La prelegvojaĝo tra Nederlando de malnova hispana esperantisto Luis Hernández, proponita de haarlema membro kaj realigita de amsterdama membro estis grandioza sukceso tiel por la preleginto kiel por la proponinto kaj realiginto.
La sekcioj kaj distriktoj, kiuj akceptis la hispanon certe longtempe memoros la ĝuplenajn horojn, kiujn tiu ĉi vortskulpisto en suka lingvo kaj per vervo propra al la hispana popolo donacis al sia aŭskultantaro.
Imitinda ekzemplo kaj sukcesplena rimedo por teni la interesiĝon por Esperanto vivanta.
Dankon al ĉiuj, kiuj kunlaboris en tiu ĉi bonega aranĝo.

**RADIO**

„Vara" komplezis doni subtene al nia „Verda monato" al la prezidanto de Instrua Servo, la okazon paroli antaŭ ĝia mikrofono.
Dank' al la bonega parolado la sekretariejo de F.L.E. ricevis kontentigan kvanton da informpetoj.
La radio estas potenca propagandilo kaj tial mi aŭdacas konsili al nia membraro en „Vara"-kunvenoj kaj perletere instigi, instigadi la unuiĝon de radio-amatoroj de tempo al tempo cedi iom da tempo por nia kultura laboro.

**SIMPATIANTOJ**

Pri la varbitaro en la armeo de simpatiantoj, ni ne povas haleluje kanti.
Interkrampe estu menciate, ke tiu fako iradas 5 jarojn kun la sama rezulto kiel en la unua jaro, eĉ malpli limake.
La nombro por 1956 estas 1075. Tiu ĉi afero ne estas bone administrebla pro manko de taŭgaj informoj.
Sed tio estas io propra al nia movado, nur kelkaj sekcioj montras komprenon pri organizo.
En 1953 ni notis 1199. Por la jaro 1954 1307.
La jaro 1956 montras regreson ĝis la modesta cifero 1075. La nombro da sindikatoj, kiuj rekte rilatas kun la asocio estas 9.
Pere de la sekcioj ni nun havas 25 sindikatojn, kiuj rilatas kun la sekcioj.
Komence ni revis, ke facilmaniero 10.000 simpatiantoj dum du aŭ tri jaroj estas realigeblaj. La praktiko instruis nin, ke ankaŭ tiu tasko tro pezas. Ĉiuj membroj bone pripensu, por nia movado la mono kuŝas sur la strato.
La simpatianta fako estas laboro tute normala, ĉiuj aliaj societoj faras tion.
Tiuj sekcioj, kiuj fidele kaj modele laboris por tiu fako meritas nian sinceran dankon.

## Membro-administracio

Se ni konsideras la membro-nombron de nia asocio, ni certe ne povas fanfaroni. Tamen estas eble varbi kursanojn. Tion pruvis K-do Winkel el Schagen. Li ĉiusemajne faris la vojaĝon al Den Helder por instrui dek kursanojn; post la fino li fondis sekcion Den Helder.
Por la homoj, kiuj havas la argumentojn ke Esperanto ne taŭgas, ĉar la angla lingvo estas la mondlingvo, vi nur rimarkigu ke ĉiutage oni povas legi en la gazetoj ke la estroj de la entreprenoj en kiuj laboras la hungaraj rifuĝantoj petas tradukistojn, ĉar ili ne komprenas la anglan aŭ germanan lingvojn.
Ankaŭ ni havas taskon helpi la rifuĝantojn esperantistajn; se estas inter ili kiuj parolas nian lingvon, ni zorgu, ke ili partoprenu al la klubvesperoj, por ke ili alkutimiĝu al la novaj cirkonstancoj.
Se ni en la sekvonta jaro laboros, ĉiu sur sia tereno, mi sekvontan fojon certe povos raporti pri progreso!

Membro-nombro F.L.E.
La 1an de oktobro 1955a ni nombris:

1503 sekciaj membroj
94 ĝen. membroj
1597

La 1an de oktobro 1956a ni nombris:

1355 sekciaj membroj
94 ĝen. membroj
1449

Regreso 148 membroj.
F.L.E. havas 72 sekciojn.

## Instrua servo

La sukceso de la agado de Instrua Servo grandparte dependas de la propagando en la sekcioj kaj distriktoj.
Tion ni denove spertis en la raportjaro (1-10, 1955a—30-9, 1956a). En la komenco de la agadjaro la eldono de la propagandakurso „La Lernanto" kaŭzis miskomprenon pri la eblo propagandi la sekciajn kursojn kaj la ceterajn lernilojn de Instrua Servo. En la Hilversuma kongreso oni detale raportis pri la rezultato, kiu ne kongruis kun la multa laboro, kiujn postulis de Instrua Servo la kompilado, stencilado kaj ekspedo de la lecionoj.
La multega laboro malhelpis al ni la ĝustatempan pretigon de la materialo por nia nova M.kurso, nepre necesa pro la ŝanĝiĝo de la ekzamenoj. Kelkaj anonciloj, ricevitaj jam antaŭ la pretigo ja pruvis la bezonon.
Jen, la kaŭzoj pro kiuj ni povis enskribi nur kelkajn gekursanojn en la listo por la elementa kaj E.kursoj.
La decido en la Hilversuma kongreso, propagandi grandskale la skriban elementan kurson de I.S. en la venanta studjaro, ŝarĝis nin per la antaŭpreparo de la propagandamaterialo. Ni presigis provlecionojn kaj sendis al la sekcioj kaj distriktoj ekzempleron de la kurso kaj informan cirkuleron. Ni faris aranĝojn per kiuj la funkciuloj daŭre povas kontakti kun la novaj adeptoj, kio sendube, post la studotempo, plifaciligos la varbadon al la Asocio.
Intertempe ni povis dissendi la unuajn lecionojn de la nova M.kurso. Ni estas certaj, ke la materialo plene kontentigos la studemulojn por ĉi tiu diplomo. Nova S.kurso estas en antaŭpreparo.
Por la ĉijare komenciĝintaj kursoj ni enskribis ĝis nun 68 partoprenantojn al la elementa kurso, 5 al la kurso por la E.ekzameno kaj 11 al la M.kurso. Koncerne la kurson por komencantoj ni povas paroli pri relativa sukceso. Al tio sendube kontribuis la radio-parolado de nia prezidanto, la 1an de Sept.o kaj la kunlaboro de Sekciaj geaktivuloj. Petleteroj pri kunlaborantoj en la korektado de la elementaj taskoj rezultis en dudeko da konsentaj respondoj.
La korektan laboron en la kurinta jaro faris la K-doj A. P. M. Lafeber, J. Winkel, D. Jongeleen, P. Lamfers, N. J. v. Dijk, D. de Raaf kaj A. v. d. Starre.

La nunaj gvidantoj de Instrua Servo estas:
H. KUIJT, Prezidanto.
D. JONGELEEN, Sekr.o Kasisto.
P. LAMFERS, Kursadministranto.

## Precizigo de la estrara deklaro

*La estrara deklaro en L.E. de nov. pasinta vekis kelkajn reagojn kaj informpetojn, kiuj devigas nin pliprecizigi nian starpunkton.*
*Ĝi akcentas, ke nia organizo, sur bazo de art. 2 de nia regularo, estas demokrata, socialista organizo, kultura, kiu ne volas havi ion komunan kun homoj aŭ movadoj strebantaj al diktatora agado, indiferente ĉu ili anoncas sin sub bruna, nigra aŭ ruĝa etiketoj.*
*Ĝi signifas, ke ni respektas la elementajn rajtojn homajn, mem difini sian sorton, havi la rajton organizi sin laŭ propra koncepto, libereco de gazetaro kaj sekreta balotado de parlamento. Nur sur bazo de tiuj principaj rajtoj F.L.E. havas sian ekzistopovon.*
*La atako de Sovetio al la hungara popolo devas senvualigi la okulojn de ĉiuj homoj adeptiĝantaj al la ideoj Zamenhofaj.*
*La petantan rolon de inkvizitoro ni ne povos ludi, principe ne, ĉar ĝi kontraŭas nian konsciencon kaj pli grave, ni devus respondeci al denuncoj, praktike ne, ĉar ĝi ne estas realigebla.*
*Ĉiu membro de nia organizo akceptante la ĉi suprajn principojn, povas sin senti hejme en F.L.E.*
*Per komunaj fortoj antaŭen.*
*LA ASOCIA ESTRARO.*

## BESTUURSMEDEDELINGEN

**Voorstellen voor het a.s. congres in Haarlem op 23 en 24 maart 1957 moeten door onze afdelingen en leden ingediend worden tot uiterlijk 1 januari a.s.**
**Eventuele amendementen worden ingewacht tot 1 februari 1957. Afdelingen beleggen hiervoor in de laatste week van januari een huishoudelijke vergadering om de voorstellen, afgedrukt in het januarinummer van L.E., te bespreken.**
**Wij verzoeken de afd.secretarissen dringend ons per ommegaande een volledige ledenlijst toe te zenden om onze adressenadministratie geheel in orde te maken.**

**HET BESTUUR.**

## *„Bureau: Esperanto en la lernejo"*

La agado de nia „Bureau" en 1956 ne estis tiom sukcesa kiom en antaŭaj jaroj. Venis kaj estas priparolitaj sufiĉe da planoj kaj klopodoj, sed la interesiĝo por Esperanto en geinstruistaj rondoj ne estas granda.
La „Bureau" kunvenis en 1956 kvarfoje. Nova reprezentanto por N.G.G.E. (la geinstruistaj Esp.) fariĝis S-ro P. Baas el Amsterdam kaj en 1956 mortis la reprezentanto de K.O.V. (la kath. geinstr. organizo).
En la unua kunveno „Bureau" decidis disponigi 100 guldenojn por eventuala C-kurso en Esperanto en la komunuma seminario por geinstruistoj en Amsterdam. Por tiu kurso „Bureau" faris sufiĉe da propagando, sed la rezulto estis minimuma. Eĉ ne unu partoprenonto anoncis sin. Al la kvin seminarioj, kie Esperanto estas instruata, „Bureau" decidis doni premion de *f* 7.50 en la formo de asigno por libroj, aĉeteblaj ĉe unu el la libroservoj.
Cetere esploris Bureau la eblon okazigi grandan, tutlandan demonstracion kun parolontoj, kiuj povas reprezenti dece nian movadon, sed findecidon Bureau ankoraŭ ne faris.
Kvankam en 1955 la Utreĥta komunumestraro diris, ke ĝi „ne kredis en Esperanto", nun tamen, post laboro de fraŭl. Burger el Haarlem kaj Sro Van Rijsinge, direktoro de la komunuma H.B.S. okazos Esperantokurso en tiu H.B.S.
La kontakto kun NoRoLo (la gepatraj komisionoj) estas lastatempe tre malforta. Eĉ la reprezentantino de tiu organizo ne ricevas respondon je sia korespondaj kaj ŝi promesis serĉi kontakton kun la prezidanto.
Estas bedaŭrinde, ke la direktoro de Bureau ne plu povas disponigi la tempon por la organizo kaj forlasos ĝin la unuan de januaro. L.E.E.N. do devas serĉi alian reprezentanton kaj en januaro ni elektos novan direktoron.

**DE REDACTIE**

**vraagt aan alle medewerkers in de komende maanden niet later dan de 1e van de maand in te zenden, om vroegtijdige verschijning mogelijk te maken.**


ĈU ANKAŬ VI
jam abonis nian studogazeton
LA PROGRESANTO?
Se ne, faru tion tuj, ĉar ankaŭ la nova jarkolekto fariĝos interesa kaj instrua por komencantoj, progresantoj kaj ekzamenaj kandidatoj.
Unu el la sukcesintoj en Ekzameno M skribis:
*Estimata sinjoro Lem.*
*Koran dankon pro via gratulo.*
*Mi akiris la Mezan Diplomon kune per la bonegaj taskoj kaj korektoj de vi kaj viaj kolegoj en „La Progresanto", kiuj faris la laboron agrabla.*
*Kun afablaj salutoj,*
*C. P. W.*
*Ankaŭ vi* povas profiti el via abono
Abonprezo: *f* 3.50 jare.
Por membroj de F.L.E. *f* 2.50.
Libro-Servo F.L.E., Admiralengracht 214, Amsterdam-W. Poŝtĝiro 331133.

# 1859 — 16an de decembro — 1957

Ĉie en la mondo, kie vivas esperantistoj, oni festas aŭ almenaŭ enpense rememoras, la naskiĝtagon de la kreinto de Esperanto, Dro Zamenhof. Jam proksimiĝas la 100a datreveno de tiu tago, unika okazo por ĉiuj esperantistoj en Nederlando por **komune** kaj inde rememori kaj festi tiun tagon.
Eksterstarantoj kelkfoje riproĉas al ni ke ankaŭ en la Esperanto-movado, kiu ja celas al unu mondo, unu popolo, unu lingvo, ni organize estas dividitaj. Ĉu prave? Jes kaj ne. Ni propagandas, laŭ nia religia kredo, koncepto neŭtrala aŭ politika, eĉ laŭ klasa principo. Sed tiu divideco, ŝajne malunuiga, estas multe pli afero de taktiko kaj strategio, ol de malsamopinieco inter la diferencaj adeptoj de Zamenhof.
Ĉiu esperantisto devenas de la sama fonto: la ideo por interkompreni per Esperanto survoje al plena mondunuiĝo. La vojo al realigo de tiu celo nur montras diferencajn aspektojn, kiuj tamen ĉiuj kondukas al la sama efektiviĝo. Ĝuste tial troviĝas esperantistoj en ĉiuj rondoj kaj direktoj de la homa socio, ĉar ja en ĉiuj tiuj grupoj de la homaro vivas homoj celantaj al unuigo de la homaro, sendepende de raso, klaso, religio aŭ koncepto. Tial en tiuj ĉi tagoj, kiam ni festas la datrevenon de Zamenhof, ni sentas nin **unu ronda familio** sur la tuta terglobo. La reveno de la 100a naskiĝtago de Zamenhof estu la signalo de komuna manifestacio.

En tiuj ĉi tagoj estas bona kutimo lumigi unu el la multaj facetoj el la figuro de la kreinto de Esperanto. Hodiaŭ ni volas fari ~~tion per kelkaj~~ rimarkindaj ekzemploj; kiuj pruvas ke Zamenhof ĉiam metis la aferon super sia propra persono. Por tio ni citas leteron el Bulteno de Esperantistoj el Pollando (no. 5, 1956a) direktitan al la Loka Kongresa Komitato de 8a U.E.K. en 1912 en Krakovo la subskrekoj estas de Dro Zamenhof:

14-II-1912.

Dro L. L. Zamenhof
Varsovio, str. Dzika No. 9
Karaj Sinjoroj!
En la provizora programo de la Krakova kongreso mi legis, ke Vi preparas interalie vesperon speciale por honori **min persone;** tial mi volas nun peti Vin letere pri tio, pri kio mi jam buŝe petis profesoron Bujwid, nome: ke Vi eljetu el la programo ĉion, kio povas havi ian rilaton al mia **persono.** La kongreso devas esti jubileo nur de Esperanto, ekskluzive nur de **Esperanto,** sed neniom okupi sin pri ĝia aŭtoro. Se estos ia oficiala akcepto, ĝi devas porti la nomon ne „akcepto de Zamenhof", sed akcepto de la esperantistaj **reprezentantoj";** nenie kaj neniam starigu mian buston, ne preparu por mi ian donacon, ktp.

Mi ne povas letere detale klarigi al Vi la kaŭzon de mia peto. Eble Vi mem ĝin komprenos kaj sentos, se Vi pripensis la diversajn artikolojn, kiuj en la lastaj du jaroj aperis kontraŭ Esperanto en la gazetoj de nia lando. Ankaŭ en aliaj landoj de tempo al tempo aperas artikoloj kontraŭ Esperanto, sed ili kontraŭbatalas nur la **ideon** aŭ la **lingvon;** sed ĉe **ni** tiaj artikoloj estas ordinare bazitaj nur sur pli aŭ malpli maskita malamo kontraŭ mia **persono.** Estas vero; ke mi al neniu faris ian malbonon; sed mi estas hebreo kaj naskiĝis en Litovujo.
Mi tute ne volas plendi, kaj mi ne volas paroli ĉi tie pri la esenco de intergenta malamo; mi nur konstatas la fakton, kaj mi atentigas Vin, ke oni devas esti prudentaj kaj ne inciti senbezone multajn homojn per honorado de mia persono.
Se Vi timas, ke ne-honorado de mia persono eble malagrable mirigos le esperantistojn, Vi povas tuj en la komenco de la programo klare publikigi, ke tia estis mia nepra deziro kaj la „conditio sine qua non" por mia veno al la kongreso.
En la okazo, se Vi nepre bezonos paroli pri mia persono, Vi povas min nomi „filo de pola lando" (ĉar neniu povas nei, ke la tero, en kiu kuŝas ambaŭ miaj gepatroj kaj sur kiu mi konstante laboras kaj intencas labori ĝis mia morto, estas mia hejmo, kvankam mi ne estas naciisto), sed ne nomu min „polo" por ke oni ne diru, ke mi — por akcenti honorojn — metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas.
Ĉar, por eviti ian malĝustan paŝon, Vi eble bezonas scii, al kiu popolo mi **mem** alkalkulas min, mi sciigas Vin, ke laŭ miaj politike religiaj principoj, li fariĝas polo, nek ruso, nek hebreo, sed mi estas partiano de „homaranismo" (ne miksu kun „kosmopolitismo"); laŭ mia **deveno** mi alkalkulas min al la gento **hebrea.**

Via
L. Zamenhof.

Konsekvence al tiu ĉi letero Dro Zamenhof diris en sia parolado al tiu ĉi kongreso:
Nun, kiam la matureco de nia afero estas jam tute eksterduba, mi turnas min al vi, karaj samideanoj, kun peto, kiun mi jam antaŭ longe volis direkti al vi, sed kiun mi ĝis nun prokrastis, ĉar mi timis fari ĝin tro frue. Mi petas, ke vi liberigu min de tiu rolo, kiun mi, pro kaŭzoj naturaj, okupis en nia afero dum dudek kvin jaroj. Mi petas vin, ke de la nuna momento vi ĉesu vidi en mi „majstron", ke vi ĉesu honori min per tiu titolo.
Vi scias, ke tuj en la komenco de nia movado mi deklaris, ke mi ne volas esti mastro de Esperanto, sed ke la tutan mastrecon pri Esperanto mi en tuta pleneco transdonis al la Esperantistoj mem. Vi scias ankaŭ, ke de tiu tempo mi ĉiam lojale agadis aŭ almenaŭ penis agadi konforme al tiu deklaro.
Mi donadis al vi konsilojn, kiel mi povis, sed neniam vi aŭdis de mi la vortojn: „tion mi postulas" aŭ „tion mi deziras". Neniam mi provis altrudi al vi mian volon. Tamen, konsciante, ke ĝis sia plena fortikiĝo nia afero bezonas ian enkorpigitan standaron, mi — laŭ via deziro — dum dudek kvin jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu en mi ĉefon kaj majstron.
Kun ĝojo kaj fiereco mi konstatas, ke vi ĉiam montris al mi sinceran konfidon kaj amon, kaj pro tio mi eldiras al vi mian plej koran dankon.
Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi mian rolon. La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min **antaŭ** vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur **inter** vi.
Jen estas la kaŭzo, kiu devigis min fari la nunan decidon:
La ekzistado de ia natura konstanta ĉefo, eĉ se tiu ĉefo havas nur la karakteron de unuiganta standardo, prezentas gravan maloportunaĵon por nia afero, ĉar ĝi donas al la afero kvazaŭ personan karakteron. Se al iu ne plaĉas mia persono, aŭ miaj politike-religiaj principoj, li fariĝas malamiko de Esperanto. Ĉion, kion mi persone diras aŭ faras, oni ligas kun Esperanto.
La tro honora titolo de majstro, kiun vi donadis al mi, kvankam ĝi en efektiveco koncernis nur la aferon de la lingvo, fortenis de Esperanto multajn personojn, al kiuj mi pro ia kaŭzo ne estis simpatia kaj kiuj timis, ke, fariĝante Esperantistoj, ili devus rigardi min kiel sian moralan ĉefon. Ĉiu, kies opinio pri aferoj Esperantistaj estas alia ol mia, ofte sin ĝenas, eldiri libere sian opinion, por ne kontraŭbatali publike tiun, kiun la Esperantistoj nomas sia majstro. Se ies opinion la Esperantistoj ne volas akcepti, li vidas en tio nur la ĉiopovan influon de la majstro.
Nun, kiam nia afero estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute libera, ne sole libera de ĉiuj personaj **dekretoj,** kia ĝi fariĝis jam antaŭ dudek kvin jaroj, sed ankaŭ de ĉia efektiva aŭ ŝajna persona **influo.** Estas necese, ke la mondo sciiĝu tute klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan **majstron.**
Nomu min per mia nomo, nomu min fondinto de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin, ne nomu min plu „majstro", ĉar per tiu morale tro liganta nomo vi malliberigas nian aferon.
Multaj el vi portas en sia koro la samajn idealojn, kiel mi, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo; sed la mondo devas scii, ke tiu spirita parenceco inter mi kaj vi estas laŭvola, ke la Esperantismo ne povas esti responda pri miaj personaj ideoj kaj aspiroj, kiuj por neniu el vi estas devigaj.
Se mi ion diras aŭ faras, kio ne estas konforma al la gusto aŭ konvinkoj de tiu aŭ alia el vi, mi deziras, ke tio neniun el vi ĝenu kaj ĉiuj el vi havu la rajton diri: tio estas tute privata ideo aŭ frenezaĵo de Zamenhof, kaj ĝi havas nenion komunan kun la Esperanta movado, en kiu li estas nun persono tute privata.
La interna ideo de Esperanto, kiu havas absolute nenian devigon por ĉiu Esperantisto **aparta,** sed kiu, kiel vi scias, plene regas kaj ĉiam devas regi en la Esperantaj **kongresoj,** estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton.
Ĉio, kio estas super tiu interna ideo de Esperanto, estas nur **privataĵo,** kiu povas eble esti **bazita** sur tiu ideo, sed neniam devas esti rigardata **identa** kun ĝi. —
Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo! Ĉiujn dubajn demandojn kiuj koncernas la tutan Esperantan aferon kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta Esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo, de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto!

principo: „kiu pli laŭte krias, tiu estas Neniam permesu, ke en nia afero regu la prava"! Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune.

Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava **socia problemo**, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante **propagandi** nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu **estimon** kaj **konfidon** por ĝi.

## *El la sekcioj*

**WORMER**
**Zandweg 82**

La kunveno de la 12a de novembro, en kiu k-do A. v. d. Starre parolis pri sia bicikla vojaĝo al Triesto estis tre interesa. El la streĉa aŭskultado ni povis konstati, ke ni ĉiuj partoprenis image ĉi tiun unikan vojaĝon.

FRED. LANGEBERG.

## *SAT-rondoj*

**ARNHEM**

Pro diversaj kialoj ne eblas kunveni en decembro. Pro tio ni intencas fari tion en januaro 1957a. Pri tio sekvos sciigo, almenaŭ en cirkulero de la FLE-sekcio. Legu tion atente! Kaj ne forgesu baldaŭ, almenaŭ antaŭ la fino de ĉi jaro, pagi vian SAT-kotizon por 1957a, ankaŭ por Sennacieca Revuo. La kotizo restas sama kiel pasintjare, ankaŭ por S.R.!

En januaro k-do Reuderink pritraktos la prokrastitan temon : „La Popoloj de Jugo-Slavio". Bonvolu ĉeesti!

A. HENSTRA,
Taklaan 5, ĝirn-ro 483137.

**ROTTERDAM**
**Franselaan 270 b**

Bedaŭrinde ni devas sciigi al niaj anoj, ke k-do J. Ph. Punt retiriĝis pro personaj motivoj kaj do ne parolos en nia decembra kunveno. Pro tio ankaŭ la deklamado forfalos.

Mankis al ni la tempo trovi anstataŭanton por la sama temo, sed ni tamen trovis solvon.

Nia sekretario deklaris sin preta paroli en nia decembra kunveno kaj li parolos pri „Trompoj kontraŭ asekur-kompanioj". Por aŭskulti lin, vi do venu je la 23a de decembro 1956 al la salono Strijensestraat 65, Rotterdam-Zuid. Komenciĝo je la 10.30a horo.

ADRS. KOOY, Sekretario.

### AŬTUNO

Post griza kupolo el nuba tavolo
Sin kaŝas la suno.
Jam pasis somero kaj sur nia tero
Ekregas aŭtuno.

La vento deliras, ĝi branĉojn deŝiras
Foliojn semante.
Ĝi skuas la domojn kaj puŝas la homojn
La polvon pelante.

Kaj mi, malkontente dum pluvas torente
Rigardas eksteren.
Mi vidas enue la pluvon senbrue
Falantan nun teren.

Mi ĝeme sopiras, malgaje deziras:
„Rebrilu, ho suno!"
Respondas nur vento kaj pluva torento
Ĉar regas aŭtuno.

J. H. A. SENS.

## Nia kontribuo al la Hungar-Nederlanda interfratiĝo

La lastajn tagojn ni regule povas legi en la gazetaro, ke lingvaj diferencoj estas la kaŭzo, ke la hungaraj rifuĝintoj ne ankoraŭ sin sentas hejme ĉe ni.

Per specialaj rapidkursoj oni klopodas solvi la problemojn. Por ni, esperantistoj, tio estas ja tre bela okazo montri la praktikan valoron de nia lingvo.

Ni ja disponas instruistojn, ni havas la konatan Cseh-metodon, kiu montris tiutempe en internacia medio sian grandan praktikan valoron.

Ĉu ne eblas al la nederlanda esperantistaro kune solvi la problemojn por la gastoj kaj por la gastigantoj?

Ni nun forgesu la ideologiajn diferencojn inter la diversaj grupoj da esperantistoj nederlandaj.

Se ne estas disponeble sufiĉe multe da kursoj, vi ciklostile multipliku ion tian. La kurso estu tiel por la hungaroj, kiel por la nederlandanoj.

Unue vi atentu praktikon, nur poste, se montriĝos sufiĉe da interesiĝo pri nia lingvo, oni instruu la gramatikon.

N.B.!

Atentigu pri la vera karaktero de Esperanto, tio donas plej grandan profiton.

En la fino de la kurso, kiu entenu vortojn plej ofte uzatajn en la ĉiutaga vivo, vi povos atentigi pri la grandaj ebloj en rilatoj kun alilandanoj.

La aliaj Esperanto-gazetoj nederlandaj estas petataj transpreni la ideon kaj kunlabori en la efektivigo.

Hilversumon. J. MARKUS.

## Kroniek

„La Praktiko", groot geïllustreerd maandblad in Esperanto brengt in zijn oktobernummer foto's van Esperantocongressen en bijeenkomsten: Amerikaanse esperantisten op excursie naar Mexico, Esperanto op de Harvard-Universiteit in Cambridge, het 48e Franse Esperantocongres in Marseille, een foto van het 26e intern. congres van Katholieke esperantisten in Zaragoza, Spanje, een opname van het 17e congres van Spaanse esperantisten in Barcelona, de stad waar het 5e Universala kongreso plaats had, een kiekje van esperantisten uit de Braziliaanse stad Itabuna (Bahia), een opname van cursisten aan de universiteit van La Laguna (Kanarische eilanden) (35 kandidaten slaagden voor het examen), een foto van het congres van christen-esperantisten in de Zweedse stad Jönkoping met 130 deelnemers uit verschillende landen en tot slot een beeld van het 50-jarig jubileumfeest van de Esperantovereniging uit Bilbao, waar juist de bekende Luis Hernández, ook in ons land bekend om zijn lezingen over de Spaanse literatuur, een welsprekende redevoering houdt.

En dat alles in één taal: Esperanto.

Welke bond, partij of beweging kan ditzelfde óók presenteren?

**KONSTRUA KASO (1-10-'56—1-11-'56)**

Kolektita ĝis 1-10-1956 ........ *f* 380.40

Haarlem: R. v. d. Outenaar (**venditaj poŝtmarkoj**) *f* 10.—, R. W. Zegerman *f* 2.30, k-dino vdA *f* 1.70, pluraj membroj *f* 14.10 .............. entute *f* 28.10

Rotterdam 3: J. v. Klaarwater *f* 3.—, F. Stuyfzand *f* 3.—, J. Scheffers *f* 3.—, E. de Vletter *f* 5.—, CW *f* 1.—, kune *f* 15.—

Rotterdam 6: MP *f* 1.30, AvdW *f* 0.90, AdeB *f* 1.80, A. de Boon *f* 2.50, PleC *f* 1.—, ACH *f* 1.— kune *f* 8.50

Zuilen: Kolektita dum prelego en la sekcio ................ *f* 7.—

Ĝeneralaj membroj: N. J. van Dijk, Bunnik ................ *f* 2.60

Entute ĝis 1-11-1956 .......... *f* 441.60

**Korekto.** En la junio-n-ro de LE ni menciis pagon de *f* 5.90 de Rotterdam 2. Tio devas esti: De Rotterdam 6.


**Kiel oni klopodis**

por solvi la problemon de la multlingveco oni povas legi en la baldaŭ aperonta verketo de

**G. P. de Bruin**

**HISTORIA SKIZO DE LA INTERNACILINGVA IDEO**

Jam longe sentiĝas en nia movado la bezono je konciza verko enhavanta tion, kion ĉiu esperantisto devas scii pri tiu temo. La konataj historiaj verkoj pri la klopodoj krei internacian lingvon estas tro detalaj kaj ampleksaj kaj krome ne plu akireblaj. Tial la Asocio de Laboristaj Esperantistoj F.L.E. decidis publikigi la skizon de De Bruin en libra formo, per kio ĝi samokaze celas honori la memoron pri la ĵus mortinta aŭtoro, kiu estis unu el ĝiaj plej fidelaj kaj aktivaj membroj.

Jen la enhavo: 1. Enkonduko. — 2. Provoj unuaj. — 3. Pazigrafioj. — 4. Projektoj filozofiaj. — 5. Iom da teorio. „Solresol" kaj kelkaj aliaj aprioraj projektoj. — 6. Projektoj aposterioraj. — 7. Volapük. — 8. Esperanto. — 9. El la jaroj 1880—1900. — 10. Latino sine flexione. — 11. Ido, la „lingvo di la deligitaro". — 12. Occidental (Interlingve). — 13. Novial. — 14. Interlingva (de IALA). — 15. Kelkaj aliaj projektoj. — 16. Skematismo kaj naturalismo. — 17. Lingvistoj pri lingvo artefarita. — 18. Konkludo.

Sendube ĉiuj niaj legantoj deziras posedi ĉi tiun nuntempe unikan historion. La prezo estas malalta: nur *f* 1.50.

**Ne atendu, sed tuj mendu**

ĉe Libro-Servo F.L.E., Admiralengracht 214, Amsterdam-W. Poŝtĝiro 111278.


BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL